INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Jarkolekto 15 **N-ro 1, 1985**

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 1, 1985

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090
Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

Enhavo

1. Demandetoj: (distribuitaj tra la kajero).
2. Esperanto Teachers Association: Decido pri eksiĝo.
3. Hans Fechler: Letero al la redaktoro.
4. Lentaigne: La eraroj ... de la aliaj!
5. Ben Parkinson: Kunlaborantoj serĉataj.
6. Herman Deceuninck: Letero sendata al «Monato» — rezolucio de ILEI.
7. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR:
   Seminario pri metodiko en Bad Saarow.
8. Olle Olsson: Stipendio por geknaboj.
9. Elfriede Ernst: Donaco por ILS-fonduso.
10. Taskoj por la estraro kaj landaj sekcioj dum la periodo 1984–85.
11. Raportoj de la sekcioj:
    a) Brazila Sekcio: Esperanto-kursoj kaj fremdaj lingvoj
    b) Brita Sekcio: Esperanto en Britaj Lernejoj
    c) Franca Sekcio: Instruado de fremdaj lingvoj kaj Esperanto
    d) Germana Sekcio (FRG): Lerneja sistemo kaj lingva instruado
    e) Itala Sekcio: Fremdaj lingvoj kaj Esperanto
    f) Sveda Sekcio: Fremdlingva instruado

Decido pri eksiĝo

La 30-a septembro 1984

Estimata Sinjoro Andreasson,

Mi pardonpetas ke, kaŭze de malsano, mi ne pli frue respondis al via letero.
Ŝajnas ke informletero kiun mi sendis en junio ne estas ricevita. En tiu mi skribis ke, laŭ decido de la membraro ĉe la jarkunveno, nia Asocio ne realiĝos al ILEI.
Mi bedaŭras, ke ĉi tiu informo ne atingis vin.

Sincere via,

C.L. Brooks
Kasisto de E.T.A.

Kion pensas viaj gekonatoj pri Esperanto?

Letero al la redaktoro

Hans Fechler

En IPR-84/3 mi trovis indikon ke vi volas transdoni la redaktoran laboron. Ĉar mi dum 10 jaroj devis/volis prizorgi redaktorante kvarfoje jare 64-paĝan kajeron por la «Asocio de Specialaj Lernejoj» en Malsupra-Sakcio, mi scias kiom da energio vi investis en IPR kaj kiom ŝuldas al vi la ILEI-anoj. Sur la fono de tiu mia sincera agnosko, ankaŭ de la ne malhavebla rolo de IPR por ILEI, mi volas prezenti al vi kelkajn plendojn, ideojn kaj proponojn, kiuj kreskis en mi, leginte dum mia enlita restado la lastajn kajerojn de IPR.

Negative dirite: La nomo de la revuo «I *Pedagogia* R» pretendas ion, kion ĝia enhavo ne plenumas. Laŭ mia impreso la revuo preskaŭ senescepte ĝis nun servis kiel komunikilo por tiu subkategorio de pedagogoj, kiuj instruas Esperanton kaj fervore batalas kaj luktas por la instruado de Esperanto en la lernejoj; vere grava funkcio de nia revuo, sen ia ajn dubo! Sed mia sperto, ke IPR reduktiĝas al tiu certe valora funkcio, estigis en mi demandon: mi estas pedagogo, sed mi ne instruas kaj plej verŝajne neniam instruos Esperanton. Tamen mi estas pedagogo — kiu ŝatas kaj parolas Esperanton. Do, mi ĉiam pli sentas distancon inter mi kaj la Esperanto-instruistoj. Mia aneco estas tiu de nura apoganto, iom ĉerande, ne tro kontentiga pozicio.

Mi do estas konvinkita, ke minimume du pluaj trezoroj de Esperanto, aŭ pruv-terenoj de nia lingvo ne estas sufiĉe bone utiligataj. (Mi scias, ke ĉiu vastigo de funkcio dependas de multaj kondiĉoj. Sed tia rezonado atendu je pli posta paŝo).

IPR povu funkcii por pruvi la taŭgecon kaj utilon de Esperanto ne nur por re-rilata apliko de la lingvo por ĝia propra kresko kaj la komunikado inter la servantoj de tiu kreskado.

IPR montru krome, ke Esperanto ebligas, faciligas pedagogiajn

labor-kontaktojn kaj interŝanĝojn ankaŭ en pedagogiaj medioj, terenoj, kiuj ne havas Esperanto-instruadon kiel objekton:

- informi pri instrusistemoj en diversaj landoj;
- kompari instrumetodojn (matematiko, geografio...) kaj instruobjektojn;
- informi pri eksperimentaj lernejoj; pri problemoj;
- raporti pri internaciaj pedagogiaj kongresoj, seminarioj;
- represi valorajn pedagogio-rilatajn artikolojn elprenitajn el aliaj Esperanto-gazetoj;
- informi pri la edukado de instruistoj;
- kaj tiel plu, kaj tiel plu.

IPR povas havi kaj (grave por mi) havu pluan funkcion: ĝi povas helpi interrilatigi la pedagogojn (ne nur la Esp. instruistojn); ebligi, faciligi personajn kontaktojn, ĉar Esperanto taŭgas por tiu ĉi celo, ni ja scias, sed ne sufiĉe praktikas:

- signi ĉiun artikolon en IPR per plena adreso de la aŭtoro, por ke senpera reago de la leganto estu instigata kaj facila;
- leterkeston por interrilatigi la opiniojn;
- prezento kaj recenzo de libroj;
- informoj pri aktivecoj en unuopaj landaj sekcioj;
- proponoj pri/por feriaj interŝanĝoj de loĝejoj aŭ propono de ferio-eblecoj en lokoj kie Esperanto-parolantaj pedagogoj loĝas;
- ebligi kontaktojn precipe inter tiuj pedagogoj, kiuj ne povas de jaro al jaro sinsekve viziti kongresojn, internaciajn seminariojn k.a. pro diversaj kaŭzoj (ekonomiaj, familiaj, sanstataj, profesiaj, ktp.); do inter tiuj pedagogoj, kiuj ŝatas internaciajn kontaktojn pere de Esperanto, sed preferas aŭ devas preferi skribajn (sonbendajn) kontaktojn kaj interŝanĝon de ideoj, spertoj, bondeziroj ktp. Mi mem apartenas al tiu kategorio; pro tio mi scias, pri kio mi skribas (tamen mi de tempo al tempo volonte fariĝus ano de la "kongresema partio").

Pripensinde ŝajnas al mi ankaŭ jena aspekto: krom la kunvenado de la esperantistoj en pure por-esperantistaj kunvenoj — certe grava por memkonfirmado kaj memcertigado kaj formado de stabila kaj solida identeco esperantista — ankaŭ plua formo de kunvenado estas necesa: partopreno de Esperanto-parolantoj en ne-esperantistaj internaciaj seminarioj, kongresoj k.a. aranĝoj (ĉi tie precipe

pedagogiaj). Por doni ekzemplon mi citas la aranĝojn de la «Internacia Laborcirklo Sonnenberg»; ĝis hodiaŭ mi ne renkontis en tiuj internaciaj Sonnenberg-kunvenoj iun ajn esperantiston. La esperantistojn (ekzemple) el Malto mi renkontis en Budapeŝto, dum la ILEI-kongreso, sed la amikojn de tiuj Maltaj esperantistoj mi renkontis en Sonnenberg, kaj tie mi bezonis "simultanan interpretadon" por interkompreniĝi kun ili. Kia nediskutebla varbefiko, se la Maltaj esperantistoj veturus al Sonnenberg-seminarioj kaj tie renkontiĝus kun aliaj homoj kiuj parolas Esperanton. Do IPR povus elekti interesajn internaciajn kunvenojn ne-esperantistajn, ekzemple el la Sonnenberg-programo, kaj anonci ilin kaj inviti al ili. En plua paŝo oni povus evoluigi kaj akceli strategion por tia varbefika partopreno. Esperanto kiel efika kaj valora ponto kaj servant(in)o modesta sed esperiga en ne-esperantistaj rondoj.

Mi ĉesas prezenti pluajn ideojn, ĉar mi scias, ke vi certe jam multon de la proponitaĵoj pripensis, certe. Kaj ankaŭ ke kondiĉoj eksteraj multaj ekzistas, kiuj malhelpas la realigon de eĉ la plej indaj revoj.

Bonvolu preni kaj taksi miajn frazojn ne tiom kiel kritikon de valora kaj pena laboro via, sed kiel reagon de leganto de IPR, kiu sentiĝas pro diversaj kialoj ĉe la randa zono de agrabla grupo da homoj, kun kiuj li volonte kunlaborus, sed enkadre de kondiĉoj, kiuj destinas kaj formas lian vivon.

Kiom da homoj en via lando — laŭ via taksado — parolas Esperanton?

La eraroj ... de la aliaj

J. Lentaigne

Kara kolego,

De tre longa tempo mi fakiĝis en "La eraroj ... de la aliaj"! Por tio mi elspezis/as multe da mono (poŝtmarkoj kaj respondkuponoj); eble la valoron de tri "Plena Ilustrita Vortaro"-j. Mia laboro cetere ne estas malfacila, ĉar preskaŭ ĉiam la samaj eraroj ripetiĝas.

Antaŭ skribado de tiu ĉi letero mi prenis el mia biblioteko (hazarde) IPR-2 de Majo 1974. La artikolo sur paĝo 55 estas verkita de tre kompetentaj esperantistoj. Tamen en tiu paĝo troviĝas du okulfrapaj eraroj:

- *"Eŭropa klerigadkomenco datas ek de la jaro 1890" (anst. datiĝas)*
- *"malgrandaj vilaĝoj, situitaj" (anst. situantaj).*

Kial ili eraris? Nur ili povus respondi. Sed kio okazos? Legantoj plene fidantaj al tiuj kompetentaj esperantistoj, sen kontrolo, ***imitos*** *ilin. Eble ili mem imitis alian erarinton; kaj same kiel agropiro en ĝardeno enradikiĝos eraro. El kio sekvos dialektiĝo de la lingvo.*

Ŝajnas, ke la redaktoroj de revuoj devus senhezite korekti la nekontesteblajn erarojn troviĝantajn en la manuskriptoj senditaj al ili. Mi ja konscias, ke tio postulus tempon, ĉefe se temas pri okpaĝa artikolo (kiel tiu pri kiu mi aludas). Tamen, tio valorus la penon.

Sed almenaŭ: ***oni ne semu intence erarojn en la revuojn!*** *Sufiĉas la aliaj!*

Plej sincere,
J. Lentaigne

"Ĉiu montru la erarojn, kiujn li trovis en ĝi." – (Zamenhof en O/V p. 24)

"Mi gratulas vin pro via atentigo kaj korektado de miaj eraroj." – (G. Waringhien al japana akademiano Nakamura, en Oomoto)

"Mi ĉiam havas profiton, kiam oni rimarkigas al mi miajn erarojn." – (R. Bernard)

"Sendante al ni viajn rimarkojn, vi grave helpos nin por altigi la nivelon de la revuo." – (Nuntempa Bulgario)

kaj tiel plu...

"Liberiĝi el sia nacia lingvo estas unu el la plej malfacilaj aferoj." – (Esperanta Mozaiko, p.8)

Konsili lernantojn estas facile. Multe pli tikla afero estas *atentigi* malnovajn kaj kompetentajn esperantistojn pri iliaj probablaj aŭ certaj eraroj! Tamen, ĉiu scias, ke eĉ la plej lertaj povas erari.

Se neniu kuraĝas atentigi vin, min, nin... pri gramatikaj eraroj, aŭ ĉefe pri niaj "–ismoj" (hungarismoj, francismoj...), kiel eviti ilin en la estonteco, kaj kiel progresi? Kiel eviti, ke — pro intimemo — eraro ne infektu la lingvon?

Estas ja konate, ke *Kritiki estas facile, fari malfacile.*

kaj *Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.*

Sed ankaŭ, ke: *En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia trabon ne vidas.*

Pro tio, jen mia vidpunkto:

1. Koncerne min, mi kompreneble **ege dankas** al tiu, kiu atentigas min pri miaj eraroj.
2. Koncerne la aliajn, mi konsideras, ke **mia devo** estas atentigi ilin pri tio kio **ŝokas** min. ("ŝokas" signifas, ke mi **ne** estas **absolute** certa, ĉu mia rimarko estas ĝusta.)

Kara korespondanto, se vi samopinias kiel mi, mi estas certa, ke vi ne ofendiĝos kaj mi dankas pro via atento. Bonvolu diri al mi, ĉu vi konsentas pri miaj rimarkoj.

☆ ☆ ☆

Bonvolu korekti en PIV kaj PAG jenajn esprimojn, kiujn Waringhien konsideras eraraj:

1. En PAG (p. 100, linio –17): "ĵus" devas esti "*tuj* antaŭ la poseda..."

2. En PIV (ĉe «ankoraŭ»/Rim.): "ankoraŭ troviĝas ĵus apud..." devas esti "... *tuj* apud..."
3. En PIV (ĉe «atendi»): "Li estas atendata de ĉiuj liaj admirantoj" devas esti "... de ĉiuj *siaj* admirantoj"
4. En PIV (ĉe «ŝanĝi»): "tia ke ĝi ŝanĝas" devas esti "tia ke ĝi *ŝanĝiĝas*"
5. En PIV (ĉe «atlantiko»): "trans..." devas esti "*tra...*"
6. En PIV (ĉe «okulo»): "kion mi ne farus por viaj belaj okuloj" devas esti "*kiom multe mi donus* por ..." (v. KIOM)

Respondo de G.W. al jena demando: Se "paroli" estas netransitiva, kial "paroli Esperanto**n**" kaj "Esperanto parol**ata**"? — La solvo estas, ke post *paroli,* la komplemento "lingvon" estas io, kion oni povas asimili al la "objekto de la interna ago" nomata ankaŭ "etimologia figuro" (PAG, § 119, Rim. II). "Paroli la anglan lingvon" povas esti klasita en la saman kategorion kiel "dormi profundan dormon" aŭ "morti heroan morton". — "Paroli" kontraste kun "diri" estas esence netransitiva. En la rusa, tiu distingo ne ekzistas, kaj tio klarigas, ke Zamenhof uzis "paroli" en okazoj, en kiuj ni uzus "diri".

G.W. atentigas ankaŭ pri la ofta misa uzo de "korespondi" anstataŭ "respondi" (precipe fare de Francoj). Oni diru ekzemple "Oni faru la ekzercojn de la *responda* leciono", sed ne "... de la koresponda leciono". (Vidu PIV sub «respondi 3»).

Sed kio okazus, se iu malamiko de Esperanto pruvus ke la esperantistoj mem ne scipovas sian lingvon?

Ekzemple: en «Esperanto» (aprilo 1981, p. 67) doktorino F. S-F., ĝenerala sekretariino de UEA, skribas: "*ĵus* antaŭ nia foriro". — Okaze de la kongreso de Unuiĝo Franca por IPR (81-06-07), de le podio kie oni urĝe atendis la kasiston, tre kompetenta persono anoncis: "*ĵus* enir**as** la kasisto"! — En «El Popola Ĉinio» (1981/5, p. 13) oni povas legi: "*Ĵus* kiam la ĉinaj esperantistoj pasigis sian Printempan Feston, ili bonvenigis amikan senditon de UEA".

Se kompetentaj esperantistoj, se valoraj revuoj eraras, kion do faros la ordinaruloj? Nenion alian ol ... imiti la erarojn, ĝis "pro la uzado" la *eraro* fariĝos *regulo.* Dissplitiĝos, dialektiĝos la lingvo tiam. Tiu situacio estas vere **danĝera**. Oni memoru, ke la bazo de nia lingvo fontas el la Zamenhofa literaturo. Ĉiu posedu kaj legu

«Hamlet», «Marta», ĉiu konsultu la Fundamento-n, Lingvajn Respondojn, kiujn oni ŝajne neglektas aŭ ignoras. Ni feliĉe disponas nun pri du normigaj libroj: Plena Ilustrita Vortaro kaj Plena Analiza Gramatiko (PIV kaj PAG).

Sed tiu kiu eraras bedaŭrinde **ne** konsultas ilin! Nepre necesas, ke **alia** persono atentigu la kulpanton pri ties eraroj; oni ja pli bone vidas la erarojn de la aliaj ol siajn proprajn! Se temas pri libro, la verkisto nepre kontroligu sian verkon fare de **du** alilingvaj kompetentuloj. La legantoj bojkotu nefidindajn verkojn! Se temas pri artikolo por revuo: same! La aŭtoro devus ĝin kontroligi. Aŭ, se ne eblas, la redaktoro devus atenti ne enlasi erarojn. Temas do pri "prevento"! Se tamen enŝteliĝis eraroj, ne decas por la revuo lasi ilin sen korekto! Ĉu vere estus granda ĝeno, se la revuo malfermus etan rubrikon: «Bonvolu korekti»? Ekzemple pri *El Popola Ĉinio*: "En nia n° 5/1981, p. 13, 1-a kolumno, anstataŭ "Ĵus kiam" bonvolu korekti jene "*Ĝuste* kiam" (Konsultu PAG § 90 kaj § 248).

Ĉiu revuo povus aŭ devus komisii plurajn legantojn 'pluki' la erarojn el ĉiu numero. Nur per konstanta, severa, interhelpa viglado ni bremsos la naturan emon al dialektiĝo.

(J. Lentaigne, 3 av. de la Gaillarde, Montpellier, Francio)

Ĉu ekzistas oficiala nombro da ekzamenitaj esperantistoj?

Rezolucio de ILEI

Herman Deceuninck

Mi legis la tekston de la rezolucio de ILEI, aperintan en *Monato* 11/84 kaj kiu estis sendita fare de ILEI al ministroj pri edukado.

Profesie deĵorante en la Flandra Ministerio pri Edukado, mi povis konstati la efikon kiun tiu rezolucio provokis ĉe la decidaj konsilistoj de la ministro, t.e.: inspektoroj pri lingvoj unualoke kaj poste la ĝeneralaj inspektoroj, kiuj siavice resumas la respondojn de la inspektoroj. Estas tiuj respondoj, kiuj trovas sian vojon tra la cetera administrado ĝis la ministro.

La rezulto estis ke la konsilo al la ministro estis negativa: ne allasi Esperanton nek en la bazlernejoj nek en la mezgradaj lernejoj en la *nunaj* cirkonstancoj, ĉar la lernantoj jam nun estas tiel okupataj per lingvolernado ke ne plu restas tempo aldoni kroman lingvon. Do temas pri organiza malhelpo. Sed la konsilo povus esti pli negativa se la ĝeneralaj inspektoroj estus transprenintaj la negativajn konsilojn de iuj inspektoroj pri la ecoj de Esperanto kiel lingvo internacia. Tamen tio feliĉe ne okazis. En konversacioj kun tiuj decidpovaj homoj mi konstatis ke ofte ilia kontraŭargumentado estas ke Esperanto ne reprezentas propran kulturon kaj ke konatiĝo kun alia kulturo ĉe la studado de aliaj lingvoj forte motivigas studentojn.

Estas bedaŭrinde konstati kiel ni malsukcesas. Estus pli malsaĝe persisti en nia agado sen pripensi kritikon de iu kiu konas la situacion de interne. Tial mi konsilas:

1) La kondiĉoj/situacio ne estas sama en ĉiu lando. Tial ni adaptu niajn petojn laŭ la enlandaj eblecoj. Unu sama rezolucio por ĉiuj ne ĉiam estas oportuna.

2) Sendi rezolucion sen antaŭa preparado de la tereno, t.e. sen informi ĉiujn kiuj devas doni sian konsilon/opinion pri niaj proponoj ne havas sencon.

3) Okaze de sukcesa agado en unu lando, necesas ke en la aliaj landoj ni agu *samtempe* konforme al komuna strategio (vd punkton 2). Gravega laŭ mi estas ne tuj voli peti ĝeneralan enkondukon. Tio ne estas realisma. Ni petu (kun iom da ŝancoj al sukceso) la *oficialan* organizadon de *limigita lingva eksperimento* (ekz. en nur kelkaj lernejoj) kondiĉe ke ankaŭ almenaŭ unu aŭ pli da aliaj landoj pretus fari tion. Estas psikologie ankaŭ grave scii ke aliaj volos entrepreni tion, se oni decidas permesi ĝin. Surbaze de eventualaj pozitivaj spertoj ILEI estus en pli bona pozicio por intertrakti aliajn eblecojn al plua progreso. Ni ne perdu la esperon, ĉar progreso eblas se ni akceptas kritikojn ankaŭ de niaj kontraŭuloj! El tiuj ni devus ion lerni. Post longa preparado de la vojo unu homo (nome S-ro Symoens) preskaŭ sola atingis ke la flandra nederlandlingva universitato (VUB) de Bruselo, kiel unua universitato en Belgio, ekde oktobro 1985 allasos Esperanton kiel nedevigan kaj libervolan lernobjekton. Tio ne estis rezulto de rezolucio iu ajn, sed de persista kaj sistema preparado de la tereno.

(H. Deceuninck, Lusthuizenlaan 1, bus 4, B-1500 Halle)

Kiom da homoj lernis post la dua mondmilito en via lando Esperanton pere de la lernejo?

Seminario pri Metodiko en Bad Saarow

En la jam konata seminariejo de Bad Saarow ĉe Berlino (DDR) okazos de 9a ĝis 14a de decembro 1985 denove internacia fakseminario.
40 fakuloj traktos la temon "Problemoj de metodiko de Esperanto-instruado al plenkreskuloj".
La partoprenkotizo estas 100 markoj, pageblaj surloke. Civitanoj el socialismaj landoj pagos en DDR-mono, civitanoj el nesocialismaj landoj pagos la kontraŭvaloron en dolaroj aŭ okcidentaj markoj.
Interesitoj skribu al: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, DDR-1080 Berlin.

Ĉu vi serĉas korespondantojn por viaj gelernantoj? – Sendu la nomojn al IPR!

Donaco por ILS-Fonduso

En IPR-2/1984 mi legis, ke la estraro de ILEI decidis aranĝi ILS-Fonduson kaj tiucele alvokas la gesamideanojn donaci monon.
Volonte mi kontribuas kaj sendas pere de mia banko SK 3000 (tri mil svedajn kronojn) por la Internacia Lerneja Semajno, aŭtune 1986, al ILEI.

Kun samideanaj salutoj,

Elfriede Ernst, simpatiantino kaj membro de la Belga Sekcio

Mi estas hispana instruisto, membro de ILEI , kaj faras doktoriĝan tezon pri libereco inter Esperanto kaj la angla, hispana, itala lingvoj. Mi deziras scii pri libroj aŭ artikoloj kiuj analizas kaj komparas diversajn lingvistikajn aspektojn de kelkaj el ĉi tiuj lingvoj. Mi serĉas kunlaborantojn kaj povas pagi por kontribuo en iu ajn senco. Mia adreso estas: Ben Parkinson, Pasaje Lepanto, 6 - 4°, 3 B, 14011-Cordoba, Hispanio.

Stipendio por geknaboj

Olle Olsson

Instruistoj, membroj de ILEI!

Se vi havas Esperanto-lernantojn en *deviga* lernejo, vi povas peti stipendion por knabo aŭ knabino, kiuj partoprenos infankongreseton aŭ similan aranĝon, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.
Detalajn regulojn sendos:

Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund.
(Bonvolu aldoni respondkuponon!)

Kion lernas viaj gelernantoj pri la komenciĝo de la dua mondmilito? – Bonvolu citi el lernolibro!

Taskoj por la Estraro kaj Landaj Sekcioj

dum la periodo 1984–1985

1. Prepari:
   a) Bazan instruprogramon por la 3-a kaj 4-a klasoj;
   b) Daŭrigan instruprogramon por la 5-a ĝis 8-a klasoj;
   c) Instruprogramon por mezgradaj lernejoj.

1.2 Horaron de instruplanoj laŭ fakoj, kaj lokiĝo de Esperanto en ĝi. (Precipe por la baza kaj daŭriga programoj).

2. Prepari la raporton pri la "Ronda Tablo" en Ljubljana. (LKK)
3. La Sekcioj preparu duonjaran raporton al siaj ministerioj pri la aktivecoj en la lernejoj, apogante sin al Unesko-Rezolucio 1954 kaj kopie informu siajn Naciajn Unesko-Komisionojn, ILEI-reprezentanton ĉe Unesko en Parizo kaj preparu informojn por loka, landa gazetaro.
4. Ebligi al kvin gelernantoj partopreni Internacian Lernejan Semajnon en Grésillon en la jaro 1987.
5. Al la redakcio de IPR estu sendataj raportoj, analizaj kaj informaj kontribuaĵoj.

☆ ☆ ☆

Mi tre dankas la kunlaborantajn sekciojn, kiuj sendis la superrigardon pri siaj lernejaj sistemoj. Sed facile vi povas konstati, kiuj sekcioj entute ignoris nian urĝan peton. Jes, ILEI restos malforta, ĝis ... ...

Brita Sekcio

Esperanto estas oficiale instruata en tre malmulte da britaj lernejoj. La plej grava malfacilaĵo estas ke ĉiu kapabla lernejano devas — aŭ sentas sin devigata — studi nur tiujn studobjektojn en kiuj li/ŝi povas sukcesi ekzamene, laŭ la publika ekzamensistemo, tiom aprezata de gepatroj, superaj edukaj instancoj kaj dungantoj. Ĝis nun la ekzamenaj instancoj rifuzis ekzamenon en Esperanto.

Estas kelkaj lernejoj kie oni ofertas Esperanton kiel eksterhoran klubon aŭ agadon. Ĉiu brita lernejo estas aŭtonoma instanco; do ne eblas detale priskribi la instruplanon por fremdaj lingvoj. Kutime oni komencas lerni lingvon (plejofte la francan) je la aĝo de 11, kaj tiu studado ofte fariĝas nedeviga post du aŭ tri jaroj. Samtempe kelkaj lernantoj rajtas studi duan lingvon kune kun aŭ anstataŭ la unua.

Franca Sekcio (1984)

Elementaj lernejoj:

Ĝenerale neniu fremda lingvo estas instruata (krom en eksperimentaj lernejoj) en la elementaj lernejoj. Escepte, en la regiono Alzaco la germana lingvo estas nun instruata kiel fakultativa studobjekto en la 3-a kaj 4-a jaroj de la elementa lernejo *sume* 2 horoj semajne, kadre de la instruhoroj, fare de la klasa instruisto.

Postelementaj lernejoj:

13 lingvoj estas lerneblaj: angla, germana, hispana, itala, literatura araba, ĉina, japana, moderna hebrea, nederlanda, pola, portugala, rusa (+ eble ankoraŭ aliaj). Sed ĉefas larĝe la angla lingvo, kiel tion montras la suba tabelo:

Ŝtataj lernejoj

angla	germana	hispana	itala	aliaj
82 %	14,8 %	2,2 %	0,3 %	0,6 %

Privataj lernejoj

angla	germana	hispana	itala	aliaj
91,2 %	7,3 %	1,1 %	0,1 %	0,3 %

Esperanto en la franca lerneja sistemo

En elementaj lernejoj Esperanto estas instruebla ekster la normala horo, krom se ekzistas aparta permeso de la Akademio-inspektoroj. Ĉefe instruata en "Acitivités d'éveil". — En 1984: 7 lernejoj.

En mezlernejoj kaj liceoj Esperanto estas instruebla en la kadro de la soci-edukaj aktivaĵoj, do en la lernejoj, sed ekster la normala horaro. Ĝin instruas instruistoj de la lernejo aŭ eksteruloj. — En 1984: 22 mezlernejoj kaj liceoj.

En universitatoj ekzistas oficialaj kursoj kun diplomoj por la studentoj en Aix-en-Provence, Ĉlermont Ferrand, Rennes kaj Paris-VIII.

La Esperanto-kursoj en lernejoj estas ĉiujare listigataj de GEE kaj UFE, laŭ informoj sendataj de ties membroj. Sed verŝajne ekzistas pliaj.

Germana Sekcio (FRG)

Germanio konsistas el 10 federaciaj "landoj" kun 10 memstar kulturministerioj, plus asociiĝinta Okcidenta Berlino.

La lerneja strukturo

1. *Elementa lernejo*: 1-a ĝis 4-a lerneja jaro.
2. *Sekundarŝtupo I*: 5-a ĝis 10-a lerneja jaro.
   a) orientiĝa ŝtupo: 5-a kaj 6-a jaro.
   b) ĉeflernejo: 7-a ĝis 9-a lerneja jaro.
   c) reallernejo (mezgrada): 7-a ĝis 10-a lerneja jaro.
   d) gimnazio: 7-a ĝis 10-a lerneja jaro.
3. *Sekundarŝtupo II*: 11-a ĝis 13-a lerneja jaro;
   aŭ: gimnazioj (superaj lernejoj) kaj faklernejoj.

En kelkaj federaciaj landoj varias la sistemo. Tie ne ekzistas orie iĝa ŝtupo; la gelernantoj tuj vizitadas la tri diversajn lernej tipojn (ĉeflernejo 5-a ĝis 9-a; mezgrada lernejo 5-a ĝis 10 gimnazio 5-a ĝis 13-a lerneja jaro).

Lingvo-instruado

1. *Elementaj lernejoj*:
   En la elementaj lernejoj oni kutime ne instruas fremd lingvojn. En kelkaj federaciaj landoj okazas eksperimentoj en 3-a kaj 4-a klasoj rilate la anglan lingvon. Nur malmultaj l ejoj daŭrigas la instruadon per libervolaj aktivecoj (po unu ho semajne).
2. *Sekundarŝtupoj I kaj II*:
   Ekde la kvina klaso la angla lingvo estas deviga fako; escept oni permesas en kelkaj landlimaj lokoj kaj en kelkaj klasi gimnazioj, kie oni komencas per latina lingvo. Kutime instruas la unuan fremdan lingvon po 5 horojn semajne.
   a)En ĉeflernejoj oni daŭrigas ekde la 7-a klaso per 3 ĝis 4 ho la anglan lingvon.
   b)En reallernejoj (mezgradaj) la angla lingvo estas same da igata, sed oni rajtas alelekti duan fremdan lingvon (kutime francan).
   c)En gimnazioj oni daŭrigas la instruadon de la angla lingvo. gelernantoj devas elekti duan devigan lingvon en la s klaso. Plejparte ili elektas la francan, sed ankaŭ la latinan

kelkfoje la hispanan. — Ekde la 9-a klaso la gelernantoj rajtas libervole lerni trian lingvon; tiu dependas de la disponeblaj instruistoj. Semajne oni instruas ĉiun fremdan lingvon inter po 3 ĝis 6 horoj.

En 1982 vizitis 5,8 milionoj da gelernantoj la sekundarŝtupon (5-a ĝis maksimume 13-a klaso). La sekvantaj lingvoj estis de ili lernataj:

5 200 000 gelernantoj: la anglan;
1 400 000 gelernantoj: la francan;
30 000 gelernantoj: la hispanan;
25 000 gelernantoj: la rusan;
— kelkaj miloj lernadis la italan.

Instruado de Esperanto

En la oficialaj instruplanoj Esperanto ne havas lokon. Tamen la "Konstanta Konferenco de la Kulturministroj" (11 membroj) decidis en 1962 ke oni rajtas instrui kaj lerni Esperanton libervole en kromaj aktivecoj. Nur en la lando Bavarujo oni povas instrui la internacian lingvon kiel aldonan programon po 3 horoj semajne, en la 12-a kaj 13-a klasoj de la gimnazio.

Ĉi-jare Esperanto estas instruata en:

2 gimnazioj (en unu eksperimente en la 10-a kaj 11-a klasoj)
2 reallernejoj
1 profesia lernejo
1 elementa lernejo en du 3-aj klasoj.

En kelkaj inter la supre menciitaj lernejoj la lecionoj okazas en la kadro de kutima lerneja horaro. La gelernantoj ricevas unu aŭ dufoje en la semajno 45-minutan instrulecionon.

Itala Sekcio

Elementaj lernejoj (5 jarojn)

Nuntempe oni ne instruas fremdajn lingvojn. La komisiono "Fassino", kies prezidanto estas Senatano G. Fassino, ekde la 14a de Majo 1981 prilaboris novan programon jam aprobitan de la Parlamento koncerne enkondukon de instruado de dua lingvo, diferenca de la nacia, kiun oni intencas instrui po 6 horojn semajne. Se tiu programo estos aprobita definitive, ĝi funkcios ekde la lerneja jaro 1985–86.

Mezgradaj lernejoj (3 jarojn)

Dum 3 horoj en la unua, dua kaj tria jaroj. Ĝenerale oni instruas la anglan kaj francan lingvojn.

Superaj lernejoj

a) *Klasika liceo* (5 jarojn)
Oni instruas fremdan lingvon nur en la unua kaj dua jaroj po 4 horojn semajne. Neniun fremdan lingvon en la tri aliaj studjaroj.

b) *Porinstruista lernejo* (4 jarojn)
Oni instruas fremdan lingvon nur en la 1-a kaj 2-a studjaro po 4 horojn semajne. Neniun kroman lingvon en la 3-a kaj 4-a studjaroj.

c) *Scienca liceo* (5 jarojn)
Oni instruas fremdan lingvon po 17 horojn semajne, tiel: en la 1-a studjaro po 3 horojn; en la 2-a studjaro po 4 horojn; en la 3-a studjaro po 3 horojn; en la 4-a studjaro po 3 horojn; en la 5-a studjaro po 4 horojn. (Tri klasoj studas la anglan, unu studas la francan.)

d) *Teknika komerca instituto* (5 jarojn)
Oni instruas fremdan lingvon po 3 horojn en la 1-a kaj 2-a studjaroj; po 2 horojn en la 3-a studjaro. Neniun fremdan lingvon en la 4-a kaj 5-a lernjaroj.

e) *Teknika lernejo por termezuristoj* (5 jarojn)
Oni instruas du fremdajn lingvojn po 6 horojn semajne en la 1-a ĝis 3-a studjaro. Neniun ekstran lingvon en la 4-a kaj 5-a studjaroj; kiel duan lingvon oni lernas la germanan.

En la Universitato de Trento oni povas ekzameniĝi kaj doktoriĝi pri artefaritaj lingvoj kaj esperantistiko.
Deputito Lino Armellin prezentis en septembro 1984 leĝoproponon ĉe la Deputita Ĉambro pri enkonduko de instruado de la internacia lingvo en superaj lernejoj.
Deputito ĉe la Eŭropa Parlamento Sergio Ercino akceptis fariĝi prezidanto de la grupo "Amikoj de Esperanto" ĉe la Eŭropa Parlamento.
Oni havas malfacilaĵojn konvinki la ŝtatajn instancojn permesi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, kaj kiam oni escepte permesas tion, la instruistoj ne ricevas salajron.

Mallonga raporto pri la stato de Esperanto en la italaj lernejoj

Esperanto estas instruata ne oficiale en kelkaj ŝtataj lernejoj laŭ la bona volo de kelkaj instruistoj, kiuj ricevas de jaro al jaro permeson fare de sia lernejestro aŭ per formala peto al la konsilio de gepatroj. La instruistoj ricevas neniun kroman salajron kaj ofte estas devigataj instrui ekster la normala lerneja horaro posttagmeze.

Dum la lerneja jaro 1983–84 oni instruis Esperanton en:

LOKOJ	*LERNEJOJ*	*GEINSTRUISTOJ*
Asti	Scuola Elementare	C. Aldo
Bari	S.E. Guadagni	N. Lasalandra
	„ 2-a Capurso	N. Lasalandra
Bologna	Scuola Media Grazini	F. Codicè
	S.E. Tambroni	M. Pederzini
	S.E. Gualandi	Sr Zambrini
Bolzano	Liceo Scientifico	A. Montalbini
Caltagirone (Catania)	Ist. Tecnico Industr.	G. Nicastro
– Paterno (same)	Liceo Scientifico	E. Virgillito
Como	Liceo Linguistico	A. De Giorgi
	Scuola Media Leopardio	A. Aceto
Cagliari	S.E. Pirri	N. Pala
Lucinico (Gorizia)	S.M. Perco	M. Di Maso
Udine	S.M. Valussi	E. Cordovado
Livorno	S.E. Collodi	L. Neri Lami
	S.M. Borsi	L. Bassi
Mantova	S.M. Sacchi	P. Gorini
Milano	S.M. Marignoni	G. Mora
	Ist. Profess. Marignoni	S. Giacchino
		G. Corrado
	Bollate Scuola Prora	G. Corrado
	Novate Milanese I.P. Marignoni	G. Mora
Modena	Ist. Tecnico Commerciale	P.M. Tacconi
	Ist. Tecn. Femminile	C. Agostini
Benevento	S.M. Vitelli	Mignosi & Polese
Treviso	Liceo Artistico	S. Boschin
Vasto (Chieti)	S.E. S. Salvo	R. Di Princio
Vercelli	S.M. Ferrari	M. Sola
	Ist. Tecn. Commerc.	M. Sola
Mira (Venezia)	S.E. Col di Bas	S. Tarlindano
Villaverla (Vicenza)	Scuola Media	Sr Pendin
Nove (Vicenza)	Scuola Media	Sr Fabian
Massa	S.E. Poggioletto-Villette	J. Bertozzi

Sveda Sekcio

La deviga lerneja sistemo en Svedujo dividiĝas laŭ tri "stadioj": la 1-a ĝis la 3-a klaso; la 4-a ĝis la 6-a klaso; la 7-a ĝis la 9-a klaso.

Ekde la kvara klaso la gelernantoj devas lerni la anglan lingvon po 3 horojn semajne. En la kvina 3 horojn kaj en la sesa 4 horojn semajne. Kiam la gelernantoj atingas la sepan klason (supera stadio) ili devas elekti inter diversaj temoj kiel tekniko, arto, ekonomio, lingvoj ktp. Kelkaj elektas lingvon. Tiam temas pri la germana aŭ la franca. Ĉiuj devas tamen daŭrigi sian lernadon de la angla lingvo en la sepa, oka, kaj naŭa klasoj.

Dum la naŭ devigaj elementaj lernojaroj la studhoroj por ĉiu klaso estas fiksitaj. Ekz. en la 4-a, 5-a kaj 6-a klasoj la gelernantoj devas viziti la lernejon po 34 horojn semajne. Se oni volas enkonduki novan temon, ekz. Esperanton, oni devas fari tion en la kadro de la fiksitaj horoj. Oni tiam devas redukti alian temon por trovi lokon por la nova.

En la elementa lernejo oni ankaŭ havas tiel nomatajn temajn tagojn, kiam oni okupas sin pri ekzemple trafiko, sano, naturo, paco ktp. Dum tiaj tagoj oni povas pritrakti internaciismon kaj informi pri Esperanto. En elementaj lernejoj ankaŭ troviĝas la ebleco instrui Esperanton dum libervolaj aktivecoj.

La angla lingvo nomiĝas "A-lingvo". La germana aŭ franca, kiujn oni ekstudas en la 7-a klaso, nomiĝas "B-lingvo". Kiam la gelernantoj venas al gimnazio ili havas plurajn elekteblecojn. Kelkaj elektas metiajn branĉojn dujarajn, t.n. "praktikajn liniojn". Aliaj elektas teoriajn branĉojn trijarajn. Ĉiuj gelernantoj en teoriaj branĉoj devas daŭrigi sian studadon de la angla (A-lingvo) kaj de la germana/franca (B-lingvo). En kelkaj teoriaj branĉoj la lernantoj devas elekti C-lingvon. Tio temas pri germana aŭ franca (se ne jam elektita en la 7-a klaso), hispana, rusa, latina, greka. Se iu gimnazio speciale petas la superan lernejan ŝtatan estraron (Skolöverstyrelsen) pri permeso instruadi Esperanton kaj ricevas tiun, ĝi povas aranĝi tion laŭ kategorio de C-lingvo. La gimnazio devas komprenebleh havi kompetentan instruiston kaj nur malmultaj tiaj troviĝas. — Dum preskaŭ 30 jaroj la angla lingvo estas devige instruata en svedaj lernejoj.

Horarplanoj por la tria kaj kvara klasoj

En Svedio oni dividas la devigajn klasojn en tri stadioj: suba stadio (lågstadiet) de 1-a ĝis 3-a klaso; meza stadio (mellanstadiet) de 4-a ĝis 6-a klaso; supera stadio (högstadiet) de 7-a ĝis 9-a klaso. En la ŝtata lernoplano de 1980, aprobita de nia parlamento, troviĝas nur tri horarplanoj. Unu por ĉiu stadio. En tiuj ĉi planoj oni parolas pri stadiaj semajnaj studhoroj, t.e. oni indikas kiom da studhoroj oni dum tri jaroj devas dediĉi al ĉiu unuopa fako. Ekzemple se oni por la meza stadio preskribas 15 studhorojn, oni devas dividi tiun nombron per 3, ricevante 5 horojn jare. Sed oni ankaŭ rajtas fari alian kombinaĵon: 4+4+7 aŭ 3+6+6. Ĉiu komunumo mem decidas pri la koncerna aranĝo.

Alia limigo estas regulo pri kiom da horoj la infanoj sume vizitas la lernejon:

klasoj:	1	2	3	4	5	6
studhoroj:	20	24	30	34	34	34

Distribuo de la ŝtataj semajnaj horarplanoj:

SUBA STADIO	*HOROJ*	*MEZA STADIO*	*HOROJ*
Angla lingvo[1]	2	Desegnado	6
Gimnastiko, sporto	6	Angla lingvo[2]	12
Matematiko	13	Dommastrumado	1
Orientigaj fakoj[3]	18	Gimnastiko, sporto	9
Slojdo	2	Matematiko	15
Sveda lingvo	29	Muziko	5
		Orientigaj fakoj	21
		Socie orientigaj	(15)
		Nature orientigaj	(6)
		Slojdo	9
		Sveda lingvo	26
Entute:	74	*Entute:*	102

NOTOJ:

1. La komunumo povas decidi pri komenco en la tria klaso, alie 0 horoj.
3. Religio, historio, geografio, naturscio, socia kono.
2. Se komenco en la kvara klaso, alie 10 horoj.

Ekzempla apliksolvo de unu komunumo:

FAKOJ	*KLASOJ*					
	1	2	3	4	5	6
Desegnado				2	2	2
Angla lingvo				3	4	5
Dommastrumado					0,5	0,5
Gimnastiko, sporto	1,5	1,5	3	3	3	3
Matematiko	4	4	5	5	5	5
Muziko				2	2	1
Orientigaj fakoj	4,5	6,5	7	7	7	7
Slojdo			2	3	3	3
Sveda lingvo	9	11	11	9	7,5	7,5
SUME:	20	24	30	34	34	34

Kiun fakon oni povus elpeli por enŝovi Esperanton estas malfacile decideble. Verŝajne oni povas anstataŭigi ĉe la angla.

Ĉu ILEI fariĝas superflua?

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo : Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo : Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo : Marc Demonty - Avenue des Missionnaires 39/B5 – B + 1080 Brussell.
Brazilo : Elvira Fontes - Rua Machado de Assis, 243 ap. 11 – 04106 Sao Paulo SP.
Danujo : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo : Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo : Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F. R. Germanujo: Sonnabend Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
Grekujo : K. Koliopoulos, str. Melissou 1, Pagrati, Gr - 11635 Ateno.
Hispanujo : Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Israelo : Josef Murĵan, p.c.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Italujo : Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa.
Jugoslavio : Anica Hurĉak, Polic-Kamova 91/III, Yu - 51000 Rijeka.
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, 8162 NC Epe.
Nordameriko : Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Portugalio : Alexander Kasesa, Calç○ Duque Lafoes 26 2○ p. – 1900 Lisbono.
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio, 51 – I-47031 Repubblica di San Marino.
Sud-Afriko : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sudakoreujo : So Gil Su – Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo : Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26215 Borotice.
Ĉinujo : Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R. : Tilla Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Kubo : Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Luksemburgo : Robert Hoegener, 4 rue des Charbons, Esch-sur-Alzette.
Malagasujo : Eugene Raveloson, B.P.1663 – 101 Antananarivo.
Malta : Anthony Mercieca – 20 Valletta Road – Qormi.
Sovetujo : Johannes Palu, Sölme 21, SU – 200016 Tallinn, Eesti NSV.

Estraro de ILEI

Prezidanto:	rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto:	Anica Hurĉak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Iugoslavio.
Sekretario:	d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario:	prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj:	Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC	Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio). Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.: S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM	Féderation Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne – 35 Avenue Jottrand 1030 Bruxelles – Belgique. Tel. 02 277 49 36.
ICEM	Esperanto – I, rue Galissonnière – Le Pallet – F - 44330 Vallet - Francio
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA	Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris. Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko: Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare
redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (40 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon de IPR.

abonprezo por nemembroj: 40 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)

2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro